



NEDERLANDA ESPERANTISTO

Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
„La Estonto Estas Nia” - 32-a jara n-ro 6

Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk.
Tel.: 0 34 10 - 36 11. Jara abono por ne-membroj: gld. 5,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

UNU MILIONO DA SURBENDIGITAJ LIBROJ PRUNTEDONITAJ!

En aprilo la „Le Sage ten Broek”-biblioteko en Nijmegen (Ned.) pruntedonis sian 1.000.000-an surbendigitan libron al blindulo. Ĉiutage 800 libroj vojaĝas el Nijmegen (Nimego) ĉiudirekten tra la tuta mondo.

La „Le Sage ten Broek”-biblioteko origine okupiĝis pri farado de „brajlolibroj” de kiuj intertempe proksimume 17.000 pretiĝis.

Antaŭ dek jaroj oni komencis ankaŭ okupiĝi pri la fako „surbendigitaj libroj” por kiu evidentiĝis ekzisti entuziasmega intereso. En 1966 oni pruntedonis ĝis 167.000 bendojn. Kompreneble plej multe el ili eliĝis al blinduloj en Nederlando, sed centoj ankaŭ estis sendataj al Bulgario, Hindio, Usono, Israelo, Sud-Afriko kaj Hungario, tute senkoste. La ricevintoj bezonas nur pagi la resendkoston.

La biblioteko povas daŭrigi ĉi tiun laboron dank’ al subvencio flanke de la Nederlanda registaro (60%) kaj la Unuiĝo „Le Sage ten Broek” en Hago (40%). Germana fabriko liveras malmultekostajn bendojn. Krome estas 130 libervoluloj kiuj enparoligis la bendojn.

Rimarkinde estas ke multaj blinduloj sciopovas Esperanton. Multaj blindaj Esperantistoj en- kaj eksterlandaj estas klientoj de la biblioteko. Kvinopo da Arnhemaj Esperantistoj laŭ peto de la direktoro de la blindulbiblioteko surbendigis la tu-

tan biblion por „The Hadley School for the Blind” en Winnesota (Illinois) en Usono. Por tiu laboro ili bezonis du jarojn. La tuta biblio nun troviĝas en la biblioteko sur 68 bendoj.

La „Le Sage ten Broek”-biblioteko estas unika en la mondo. Ĉu iu loĝas en vilaĝeto en Nederlando, aŭ ie en Afriko, aŭ en la Malproksima Oriento, la oficisto de la biblioteko enskribas lian nomon kaj li ricevas la deziratan libron.

H. G.

ATENTU!

Bonvolu sendi ĉiujn poŝtaĵojn por la Asocio ĝis 1-8-1967 al:

s-ro R. Slot,

Ernst Casimirlaan 21, ZEIST.

pro libertempo de la sekretariino s-ino J. C. Heetkamp-Senstius.

LASTMOMENTE!

Pro la politikaj cirkonstancoj en Izraelo la U.K. en Tel Aviv ne okazos. Anstataŭe U.E.A. organizos Universalan Kongreson en Rotterdam de 2-9 aŭg. en la famkonata kongresejo „De Doelen”.

ASOCIAJ INFORMOJ

Raporto pri la Libro-Servo de L.E.E.N.

La rezultato de la libro-servo estis kontentiga en la pasinta jaro. Laŭ la kalkuloj la enspezoj en la kontoj apartenantaj al la servo sumiĝis en la pasinta jaro entute f 4.861,50. La profito veninta el tiuj spezoj kaj konsistanta el la vendo de libroj k.s. kaj la makleroj pro abonoj, estis - post subtraho de la necesaj elspezoj pro afranko k.s. kaj de la regula subteno al la kaso de nia asocio - f 163,84. La libroprovizio valoras pli ol f 3.900,—.

T. Boersma,

Gvidanto de la libro-servo L.E.E.N.

EL LA SEKCIOJ

FRISA ESPERANTISTA RONDO.

Sekr.: Goutumerdijk 18, Leeuwarden.

La 21an de aprilo ni kunvenis por aŭskulti nian anon Inĝenieron J. van de Marrel el Beetsterzwaag, kiu parolis pri „Arbarkulturado”. Rememorinte danke lian interesan prelegon pasintjare pri „Terinterŝanĝo” (Ruilverkaveling), ni antaŭgojis jam ĉi tiun novan prelegon. Kaj denove la parolanto, kiu havas funkcion ĉe Ned. Heide Mij, tre kontentigis nin, nun per lerta kaj altnivela traktado de pluraj aspektoj de la arbarkulturado, kiel la klimatologa, pejzaĝa, turisma, ekonomia. La serioze preparita temo elvokis diversajn demandojn ĉe la ĉeestantaj Rondanoj. Tiel evoluigis vigla kaj instrua diskutado; denove vespero por longe rememori kaj pripreni.

Saman instruan karakteron havis la vespero kun s-ro T. E. van Popma, profesoro pri la nederlanda lingvo en Amsterdamo. Ĉi tiu parolis pri la ortografio de mondaj kaj gepatra lingvoj. Ankaŭ la temo de s-ro Van Popma estigis diskutadon, fakte la celon de niaj vesperoj!

La 5-an de majo pluraj anoj kune ĉeestis la festkoncerton de „Frysk Orkest” okaze de la Reĝina naskiĝtago kaj la Liberiĝ-rememortago. Post la koncerto de popular-klasika muziko kaj amuzigaj-muzikkaprioloj de la orkestro, ni kunestis, trinkante ion festan, en „De Plantage”.

La 20-an de majo ni fermos la sezonon per publika „Israela Vespero” en Hotelo „De Klanderij”. Ni parolos pri la Universalaj Kongresoj, speciale pri tiu en Tel Aviv; s-ro William Lord el Leeuwarden parolos pri sia restado en Israelo, speciale en la „kibuco” (kun diapozitivaj), tio nederlandlingve kaj studgrupo de popoldancgvidantoj prezentos israelajn dancojn.

Novaĵo en nia kluba vivo estas, ke ni kunvenos ankaŭ somere la unuan kaj trian vendredojn de la monato, vespere je la 19.30a horo, en Princa Gardena teĵo, nur por babila kunesto.

Sekcio Hago.

Sekr.: Van Trigstraat 20, Den Haag.

En nia kunveno de 19-4 ni memoris la 50-an datrevenon de la mortotago de d-ro L. L. Zamenhof.

En la sama vespero ni iom honoris nian kantduon Mona van Dalsem kaj Toos Schoonman, ĉar ili sukcesis en iu muzik-konkurso, ĝuste la 14-an de aprilo, kie ili gajnis la unuan premion. Granda propagando estis, ke tio okazis en ne-esperantista rondo. Vi povis aŭskulti unu kanton en la radio-elsendo de K.R.O. je la 18-a de aprilo en „Pizzicato”.

Dr. L. L. Zamenhoflaan en Zeist.

La konsilantaro de Zeist decidis en sia sesio de la 8a de majo nomi aleon en la nova kvartalo „Vollenhove” laŭ Doktoro Zamenhof. Oni komencis konstrui altdomojn kaj grupon da unufamilio-domoj, kie estas la Dr. Zamenhofaleo. Do hazardo de tiu aleo estas preta kiel unu el la unuaj. Entute venos pli ol 2200 loĝejoj. La kvanto de la domoj ĉe la Dr. Zamenhofaleo estos 12. Aliaj nomoj en la proksimeco Maria Montessorilaan, Jan Ligthartlaan, F. W. A. Fröbellaan, J. A. Comeniuslaan k.c.

W. BAATEN †

12-11-1884—26-3-1967.

Je la 1-a Paskotago forpasis en la aĝo de 82 jaroj, nia kara amiko kaj fidela membro de nia Utreĥta sekcio: S-ro W. Baaten.

Li estis unu el la plej malnovaj esperantistoj en nia lando. Jam en 1909-a li okupis sin pri Esperanto kaj la esperantomovado. De 1925-a ĝis la dua mondmilito

FORTOJ DE L'VIVO

kolekto de originalaj kaj tradukitaj artikoloj, eseoj kaj beletraj verkaĵoj de Vilho Setälä, kolektitaj kaj eidonitaj omaĝe al ĉi tiu konata kaj meritplena verkisto okaze de lia 75-jara naskiĝtago. Prezo f 8,— broŝurita.

Mendu ĉe la Libro-Servo LEEN, Borniastr. 95, Leeuwarden. Ĝirkonto 76915

S-ro Baaten instruis Esperanton al multaj samideanoj.

Okaze de lia 80-jara naskiĝtago S-ro Baaten elcktiĝis Honora Prezidanto de nia sekcio.

Enpense ni ankoraŭ kore dankas lin pro ĉio, kion li faris dum multaj jaroj por nia komuna idealo.

Al lia edzino, S-ino A. H. Baaten-Bosboom, iru niaj sinceraj kondolencoj.

Li ripozu en paco.

Utrecht.

F. Hoekstra.

Sekcio Zeist.

Sekr.: Griffensteijnseplein 42.

Ĉar la ĝenerala jarkunveno de L.E.E.N. pasintan jaron decidis, ke ĉiu sekcio aranĝu mem solenaĵon je memoro de la mortotago de Zamenhof antaŭ 50 jaroj, nia sekcio kunvenis la 5-an de aprilo (kiel kutime la unuan merkredon de la monato) en „Nia Hejmo”, Prinses Marijkelaan 14-I, por dediĉi specialan programon al D-ro Zamenhof. F-ino C. Burger deklamis poemon de Marjorie Boulton „La Zamenhofa Stilo”.

Diversaj anoj rakontis dum proks. 3 minutoj ion pri la vivo de Zamenhof, „Kion ili trovis plej valora”. Poste ni aŭdis gramafondiskojn kun kantoj de la indiĝenoj de Novgvineo. Tiu programero estis daŭrigo de la prelego de Ges-oj D-ro Galis de la antaŭa klubkunveno pri ilia spertoj en tiu lando.

Manuskriptoj por iu numero de „N.E.” atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la antaŭa monato. Ni nur akceptas ilin, se ili estas tajpitaj unuflanke de la papero, kun larĝa marĝeno, kaj verkitaj en Esperanto.

La Redaktoro.

RADIO-SERVO F.E.N.

Bonvolu noti jenajn novajn tempojn, ondolongojn kaj frekvencojn.

BERNO. Malfruiĝis je 5 minutoj, do lunde k. merkrede de 13.05a ĝis 13.15a horo kaj ĵaŭde k. sabate de 22.50a ĝis 23.00a horo. Ondolongoj ĉiam 31.46m k. 48,66m (9535 k. 6165 kHz).

BUDAPEŝTO (ĉiutage de 20.30a ĝis 20.45a horo) 19.79m 25.19 m 30.51m 41.55m 42.25m 48.10m 240m (15160, 11910, 9833, 7220, 7100, 6234, 1250 kHz).

LONDONO (BBC) nun elsendas la lastan vendredon de ĉiu monato je 19.49m 24.92m 31.55m 49.10m (15390, 12040, 9510, 6110 kHz).

VARSOVIO (ĉiutage de 16.30a ĝis 17.00 horo) 25.34m 31.01m 31.45m 3150m 41.99m 42.11m (11840, 9675, 9540, 9540, 9525, 7145, 7125 kHz):

ROMO-anstataŭigis la ondolongon 50,08 m (5990 kHz) per 25,42m (11.800 kHz). Radioamatoroj certe interesiĝas pri nova kurtunda amatora stacio. Prizorgas ĝin 15 anoj de la Vroclava Esperanto Klubo en Pollando. La elvoksigno estas SP-6-PAM; oni elsendas ĉiun sabat- kaj dimanĉvesperon.

La adreso estas: Kurtunda Esperanto Klubo SP-6-PAM, Wroclaw-17, str. Du-bois 3, Poŝtkesto 8, Pollando.

Verŝajne jam konata estas la stacio OE-3-RU de Rudolf Bartosch, kiu estas la centra figuro de la ± 10 radioamatoroj en Aŭstrujo, kiu i.a. regule kontaktas kun G-6-DK en Britujo kaj OK-2-OY en Ĉeĥoslovakujo.

Ĉar mi mem nur relative malmulte povas aŭskulti ĉiujn radioelsendojn kaj ŝanĝoj ofte nur estas menciataj dum la elsendoj, mi estos tre danka pro ĉiu informo de aŭskultanto.

W. Böttcher

Kwelderstraat 46, Leeuwarden.

LETEROJ AL LA REDAKCIO

(La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la leteroj)

Letero de prof. Lapenna.

Kun vera konsterno mi legis la tekston „Kleriĝu ni!” sur la p. 38 en la aprila numero de „Nederlanda Esperantisto”. Ŝoka estas la tuta enhavo, sed unuavice la vortoj „fifama 15-a regulo de la Fundamento de Esperanto”.

La Fundamento, nome ĉiuj ĝiaj konsistaj partoj, estas la sole imagebla solida bazo de la lingva unueco. Sen ĝi la lingvo ne estus povinta evolui unuece en ĉiuj mondopartoj, nek atingi la nunan stadion. La rigora observado de la principoj kaj reguloj de la Fundamento estas garantio por la plua interna evoluo de la lingvo, por la vastiĝo de ĝiaj praktikaj aplikoj kaj por ĝia daŭra riĉiĝado per nova kultura enhavo. Ataki la Fundamenton signifas atenci la lingvan unuecon, detruĝi ĉion ĝis nun kreitan kaj malbeligi ĉian ajn progreson. Organo de landa Esperanto-organizaĵo devus, laŭ mia opinio, neniam presigi ion similan, eĉ ne kun la rimarko, ke la redakcio ne respondecas pri la enhavo.

Por katolikoj - kaj certe ankaŭ multaj katolikoj estas membroj de LEEN - estas insultaj la vortoj „Ni demandu pri tio nian Papon en la Verda Vatikanurbo, Wembley, ĉar ankaŭ . . .” Ĉar mi mem loĝas en Wembley kaj konas bone la cirkonstancojn ĉi tie, mi povas certigi la skribinton de tiu teksto, ke en Wembley loĝas nenia „papo” kaj ke ĝi estas nenia „Verda Vatikanurbo”. En sia teksto li donis kelkajn ekzemplojn de erara uzo de la participoj. Ĉar, laŭ mia scio, neniam kiu ajn persono el Wembley instruis la Internacian Lingvon en Nederlando, li estus farinta pli bone, se li estus direktinta sian peton pri instruiĝo al iu, kiu efektive instruis la lingvon en via lando.

Evidente persono nomanta unu el la reguloj de la Fundamento „fifama”, rilatas kun la sama malrespekto al ĉiuj aliaj reguloj, inkluzive tiujn pri la pasivaj participoj. Por tiuj, kiuj akceptas la Fundamenton kiel bazon de la lingva unueco,

la senco de la pasivaj participoj estas simpla kaj pli ol klara. Same kiel -as signifas „komencita-nefinita”, tiel same -ata signifas „komencita-nefinita”. La pasiva participo -ita estas ja pasivo de la „pasinteco”, sed ĝi indikas kompletigon de la ago. Tio pli ol klare sekvas de la traduko, kiun Zamenhof donis en la Fundamento al „farita” en la rusa lingvo, nome „sdelannyj”.

Ankaŭ en la rusa ĝi estas pasivo de la „pasinteco”, sed samtempe indikas plenan kompletigon de la ago en la pasinteco. La pasinteco rilatas ĉiam nur al la ago mem el vidpunkto de la momento, kiam ĝi kompletigis. Tial ĝi ankaŭ signifas staton post la kompletigo de la ago. Precize tial „riparita aŭtomobilo” ne signifas nur ke oni riparadis la aŭtomobilon, sed signifas, ke oni finis la riparon kaj ke oni povis forveturi per tiu riparita aŭtomobilo.

Nur tio estas - laŭ la Fundamento, laŭ la tuta lingvouzo de Zamenhof konforme al la Fundamento kaj laŭ la verkoj de la plej elstaraj verkistoj aŭ tradukistoj en Esperanto - la senco de la pasiva participo -ita. Se oni rilatigas tiun -ita al fremdaj elementoj (ekzemple al alia verbo, ia tempa indiko aŭ simile), ekestas konfuzo kaj „nelogikaĵoj”. Kompreneble, „nelogikaĵoj” ne el vidpunkto de la Fundamento, sed el vidpunkto de reguloj fremdaj al la Fundamento.

Plej evidente tion pruvas la uzado de -ata kaj -ita kun la sama verbo en la sama prepozicio. Ekzemple, ni diru, „la letero estis ne nur skribata sed ankaŭ skribita”. Persono, kiu ne komprenas la participojn laŭ la Fundamento, tuj diros, ke tio estas „nelogika”, ĉar tio signifus ke la letero estas skribita antaŭ ol esti skribata! Efektive ĉiu -ita troviĝas tempe post -ata de la koncerna ago, ĉar nenio povas esti -ita, kio antaŭ ne estis -ata. Sekve, dum -ata neniam povas impliki, ke la ago plene kompletigis, -ita necese implicas ankaŭ la antaŭan atecon kaj la ankoraŭ pli antaŭan otecon.

Wembley (Britujo) D-ro I. Lapenna.

KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ**ENKHUIZEN kaj ROTTERDAM. aranĝoj de Nederlanda Esperanta Junularo en 1967 de 19—29 aŭgusto.**

La provizora programo de la junulara konferenco de 19—29 aŭgusto en Enkhuizen, ĉi tiun someron, organizata de NEJ kaj GEJ, estas fiksita. Kiel oni jam scias, parte ĝi estos feria kunveno, parte studa*. Prelegojn pri la ĉeftemo, la lukto kontraŭ la maro, prizorgos s-ro De Waard, teknikisto kaj fakulo pri tiu ĉi branĉo. En du paroladoj s-ro J. Schaap jr. prilumigos kelkajn aspektojn de arto en Nederlando; verŝajne la partoprenontoj de la konferenco havos la okazon viziti art-ekspozicion en la Dromedaro, speciale aranĝitan por la EJK. Aliaj prelegoj temos pri nederlanda literaturo, fri-saj lingvo kaj kulturo kaj la politika situacio en Nederlando.

Ekskursoj estas planitaj al Rotterdam, Amsterdam, la Fermdigo kaj Leeuwarden. En tiu lasta urbo ni vizitos la Frisan Akademion. Kompreneble oni ankaŭ forte atentos Enkhuizen mem, kun ĝiaj fama Zuiderzee-muzeo kaj abundaj atestoj pri pasinta flor-periodo.

Du filmvesperoj, distra vespero kaj balo kompletigos la programon. Fine de oktobro NEJ aranĝos internacian „aŭtunan renkontiĝon” en Rotterdam. Ni antaŭvidas kvar prelegojn, ekskurson al la maro, viziton ĉe la domo de UEA. Entute la programo de tiu ĉi kunveno, pri kiu interesiĝas la najbaraj TEJO-sekcioj, estas tre alloga. Detaloj aperos baldaŭ en la NEJ-informilo.

Wim Jansen,
prez. de NEJ.

* Vidu „N.E.” de febr. 1967, p. 16.

Internacia Junulara Esperanto Seminario 8—16 julio 1967 en Kampejo Borek Jilové apud PRAHA, Ĉeĥoslovakio.

Plena 8-taga restado, inkl. ĉiuj programeroj kostas 280 Kčs = 17.4 Ŭs. dol. Korespondadreso: Junulara Sekcio de ĈSEK, PRAHA 2, Blanická 4, ĈSSR.

Pri la Universala Kongreso 1967 vidu la unuan paĝon de tiu ĉi numero.

TRA LA LIBRARO

ĈIELARKO, antologio de fabeloj diverslandaj originale en versoj reverkitaj de Julio Baghy. Kovrilo de Jan Schaap jr. Eldonis STAFETO J. Régulo, La Laguna. Formato 12 x 18½ cm., broŝurita, 112 paĝoj. Prezo \$ 1,20. Mendebila ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.

Nova verkaro de Baghy. Kion skribi pri li? Li ja estas konata de ĉiu esperantisto pro siaj melodiriĉaj, facilkompreneblaj kaj preskaŭ senneologismaj versoj. Li, „la poeto de la popolo”, kiel nomas lin W. Auld en sia Esperanta Antologio, la de la naturo dorlotito per elstara talento, fekunda verkisto ekde 1922 kaj ĉiam daŭriganta. Tion atestas lia nova *Ĉielarko*, antologio de 12 diverspopolaj fabeloj, laŭ Baghy-maniero, do genie, verse reverkitaj. Parto el ili estas publikigita jam en revuo, sed la ideo pri kunigo de tiaj fabeloj formas novan branĉon al la ĉiam disvastiĝanta esperanta belliteraturo. Origine la fabeloj havas tre simplan temon; ofte Baghy, laŭ propra aserto en la antaŭparolo, memoras ilin nur fragmente, sed lia riĉa fantazio scias kunfandi ĉion kaj interplekti novajn kolorriĉajn erojn, per kiuj estiĝas juvelaj rezultoj. Estas ĝuo legi kaj parte relegi liajn poeziajn fruktojn en ĉi tiu verko kaj denove miri pri la maniero laŭ kiu li ĵonglas per la lingvo, per la ritmo, aliteracie, asonance, ktp. Komparante la novajn fabelojn kun lia pli frue publikigita verkaro, oni ne rimarkas evoluon en iun alian direkton. Li restas la sama popola poeto, kiu simple kaj plenfantazie povas verse esprimi sin, fidela al la jam delonge elektita kaj pli kaj pli perfektigita formulo.

La pliaĝiganta „bardo”, „paĉjo” por multaj kiuj alte taksas lian homecan personecon, malgraŭ nebona sanstato en la lastaj jaroj, evidente ne povas silenti. Denove kaj regule li manipulas kaj manipolos certe la de li tiel amatan internacian lingvon kiu donas al li tiom da vivoĝojo. Ni esperas ke li povos ankoraŭ longtempe „vibrigi la kordojn de sia libro”*, kaj . . . ke liaj amikoj avide aĉetos lian novan antologion, kies rekomendo ŝajnas al mi superflua.

Bedaŭrinde la korektado ne okazis tute zorge: restis diversaj komposteraroj ne postkorektitaj. Tamen ni devas iel senkulpigi la eldoninton, kiu post sufiĉe lon-

AĈETU VIAJN LIBROJN ĈE NIA LIBROSERVO!

Adreso: Libro-Servo L.E.E.N., Borniastraat 95, Leeuwarden.

ga de ĵoro en hospitalo pro operacio, evidente iom haste agis por „pluporti la torĉon”.

P. M.

* *La atenta leganto komprenas, ke s-ro P. M. recenzis la libron antaŭ la be-daŭrata forpaso de nia genia poeto.*

Red.

ROMEO, JULIETA KAJ LA TENEBRO romano de Jan Otčennášek. El la ĉeĥa tradukis Vladimír Vána-Prologo de Louis Aragon.

Kovrilo de Jan Schaap jr. Eldonis STAFETO J. Régulo, La Laguno. Formato 12 x 18½ cm., broŝurita, 176 paĝoj. Prezo \$ 1,80. Mendebila ĉe Libro-Servo L.E.E.N., Leeuwarden.

Laŭ la mallonga biografio dorskovrila de ĉi tiu nova STAFETO-eldono la ĉeĥa aŭtoro estas nuntempe unu el la famaj prozistoj de sia loĝlando. Li aperigis kelkajn rimarkindajn romanojn, poste parte filmitajn kaj/aŭ enscenigitajn, kaj cetere akiris ŝtatpremion. Unu el tiuj verkoj estas la supre menciita *Romeo, Julieta kaj la tenebro* (= mallumaĵo), laŭdinde esperantistigita, kies ĝekspera titolo indikas en kiun direkton gvidas nin la enhavo: naskiĝanta, sin plenumanta kaj abrupte finiĝanta amo inter hazarde sin renkontintaj junaj viro kaj virino, meze en tenebro (ĉi-loke la malluma periodo en ilia loĝloko *Prago* dum la teroraj kaj teruraj okupadjaroj fare de la naziistoj).

Junulo hazarde renkontas fuĝantan junan judinon kaj scias kaŝi ŝin en sekreta apenaŭ meblita ĉambro. Provizore ne kuraĝante informi siajn gepatrojn pri sia danĝera faro, li kaŝe forprenas ĉiutage iom da manĝaĵo el la patrino kuirujo, nutraĵo jam ege malabunda kaj malfacile akirebla pro perkupona porciumado. En ili nestiĝas kaj evoluas junece amo, pura kaj hezita, nutranta sin per ĉiaj ĥimeroj pro postmilita feliĉo. Malgraŭ tio la juna judino, dum la nepra foresto de la fianĉo, travivas angorojn neelteneblajn, precipe dumnokte kiam ŝi estas tute sola kaj timoplena en sia kaŝloko, kiun ŝi ne povas forlasi kaj kie ŝi dumtage eĉ ne kuraĝas montri sin ĉe la fenestro. Sopire ŝi pensas pri la libera stato, nostalgias al la jam forkondukitaj gepatroj, kore suferas pro timo ke oni trovos ŝin. Fine sentante

ke tamen ne plu ekzistas elirvojo kaj en la deliro de ilia amo, ŝi fordonas sin al li. Intertempe iu pornazia fispiono malkovras ŝin kaj perfidas la kaŝĉambrojn al la okupantoj. Mallonge poste, aŭdante pafadon de proksime, ŝi fuĝas en granda timo, ĝuste kiam la naziistoj traserĉas la urbon por trovi la atencintojn de la urba „ĉefprotektanto”. Kuglo de naziŝto, edukita laŭ la instruo ke ĉiu kuranta homo estas ĉasaĵo, trafas ŝin kaj mire konstatas la celinto ke li mortpafis flavstelon portantan judinon.

Ofte la enhavo memorigas pri la *Taglibro de Anne Frank*. Kaj ĉar krome pri la sama terura periodo en la historio ni posedas en Esperantujo la verkon *Maskarado ĉirkaŭ la morto*, oni rajte povas sin demandi kial pri tiu temo nova libro devis esti tradukata en la porpacan interfratiĝoncelantan internacian lingvon. La aŭtoro publicis ja aliajn rimarkindajn romanojn.

Restas tamen vero, ke ĉi tiu verko estas elstara. La subtilaj priskriboj de la premanta tenebro, de la juna freŝa amo, de la teruraj animkiriĝoj ĉe la kaŝita judino, de la ceteraj agantaj personoj, ĉu laŭte protestantaj kontraŭ la nova reĝimo, ĉu obece silentantaj aŭ timantaj esprimi sin, estas virtuoza kaj montras la spertan proziston. Ne sciante la ĉeĥan lingvon, prijuĝo mia pri fideleco de la traduko neblas, sed la lingvaĵo liverita de la tradukinto estas bonega kaj manifestas la sukecon kaj esprimriĉecon de Esperanto. Kvankam la enhavo revivigos antaŭ la okuloj de la ne plu juna generacio naŭzajn kaj amarajn rememorojn, mi tamen povas rekomendi la romanon al ĉiu kiu scias taksu bonan stilon kaj modelan lingvon, en kiu miaopinie enestas nur kelkaj nekutimaĵoj. Streĉe kaj preskaŭ senpire oni legos la rakonton ĝis la fatala fino. En la listo de postkorektoj mankas kelkaj neatentitaj komposteraroj, tamen ne ĝenantaj.

P. M.

ESPERANTA MOZAIKO, F. Faulhaber, 120 paĝa (20½ x 14½ cm), broŝurita. Eld.: Libro-Servo Asocio de Laboristaj Esperantistoj F.L.E., Marnixstraat 57, Nederlando. Poŝtĝiro 111278. Prezo ne indikita.

Serio da instruaj artikoloj iam aperintaj en diversaj revuoj, kun rekomen- da en-

konduko de s-ino E. Burgler-Jeszó, prezidantino de la Ĝenerala Nederlanda Ekzamena Komitato.

Plej gravan lokon miaopinie okupas la artikolo *Iom pri tradukado*, kun multaj bonaj konsiloj el la praktiko. Eĉ sen konsidero pri la gramatika flanko, tradukanto stariĝas dum sia laboro antaŭ multaj problemoj. Unu el ili estas: kiel traduki intence faritan kriplan lingvaĵon? Pri tiu ĉi ĝis nun nesufiĉe atentita temo la aŭtoro donas konsilajn ekzemplojn el la literaturo.

Al la aliaj artikoloj mi menciis speciale *Esperanto - la latino de la demokratio?*, pri uzindaj valoroj nebezonaĵoj neologismoj; *La interliga valoro de nia literaturo*; *La elparolo de e kaj o en Esperanto*, tre leginda por tiuj el ni, kiuj deziras nepre fiksitaĵojn pri la prononco; *Verku simple kaj klare*; *La naciisma viruso*.

Temon jam ofte traktitan en studoverkoj oni trovas sub *La absoluta partecipo*.

Helpe de klaraj ekzemploj F. montras la erarecon de adverbaj partecipo kies subjekto ne koincidas kun la subjekto de la ĉefa propozicio. Precipe se oni deziras plibeligi sian stilon per adverbaj partecipoj, oni riskas nekonscie peki kontraŭ la regulo ke la subjekto de la verbo kaj de la adverbaj partecipo devas esti la sama, ekz.: *Mi ricevis leteron de unu samideano, dankante* (d.e. *dankanta*) *al mi*.

Ke eĉ partecipoj esperantistoj jen kaj jen povas miskribi ĉi rilate, pruvas la aŭtoro mem skribante: *Mi imagas la raportiston kiel heroldon, laŭte sciigante la popolon* (d.e. *sciigantan aŭ kiu sciigas*) (p. 109).

Pri la tenecoj de la diversaj instruaj artikoloj mi ĝenerale opinias same kiel la aŭtoro. Escepton faras nur kelkaj liaj opiniesprimoj sub *Iom pri lingvaj leĝoj*. Nova korelativa serio, proponita de Sentis: *aliu, alies, aliel* k.c., montriĝis neakceptebla, pro kio oni proponis *aliuu, alities* k.c., do simplan kunigon de la radikoj *ali* kun korelativo. (Komparu *kelkiu, multies*, formoj regulaj, sed sporade uzitaj). Ke tiuj formoj ne populariĝis, F. atribuas al la fakto ke tio estas kompromiso, do . . . nekontentiga. Sed, ĉu tial kondamninda? Ĉu la tuta vivo ne konsistas el kompromisoj? Sed miaopinie li ne pravas, dirante ke tia solvo ignoras la leĝon de la minimuma peno. Tia leĝo ne ekzistas! Leĝo estas io deviga, sed tiu ĉi fenomeno estas spontanea. Ĝi do estas

nur *inklino* al minimuma peno, sed tiu inklino esprimiĝas tute aliamaniere: per la ofte renkontataj mallongigoj *k.s., ekz., m.o., k.t.p., eĉ ktp, s-ro Esp-o, esp-istoj, eĉ* per la malbela senpunkto *k* anstataŭ *kaj*.

El la sama vidpunkto F. konsideras ankaŭ *aliamaniere, alialoke* k.s., kvankam li trovas la enuzitan *a* bonega rimedo por korekti la oftege aŭdatan malbelan akcenton sur *a* en alitempe k.s. Pri tiu temo antaŭ nelonge skribis al mi malnova, tre kompetenta verkisto: „*Alialoke, alitempe* certe sufiĉas, sed ankaŭ mi lastatempe, pro la akcento, preferas la plenajn formojn (kun *-a*)”. Mi ne mirus, se la vortoj de F. malgraŭ lia intenco tamen kontribuis al popularigo de la plenaj formoj, kun *a*. La *ali*-prononco ŝokas, sed la korekto per alia ŝajne estas tro evidenta por tiuj esti rimarkata! Cetere, mi memoras ke ankaŭ Zamenhof iam uzis *aliamaniere*.

Mi atentigu ke krom la inklino al minimuma peno, ekzistas ankaŭ inklino al maksimuma peno, esprimiĝanta en multvorteco. Ankaŭ tiu ĉi temo meritas pri-trakton.

Ĉapitro min speciale interesanta, estas *Juĝu mem!*, pri recenzoj. F. pravas: recenzistoj ne ĉiam juĝas objektivite, kaj ofte lasas sin gvidi de antaŭjuĝoj. Mi aldonu: ke ekzistas recenzantoj kiuj eĉ ne estas kapablaj por formi al si juĝon. Pri tio mi jam iam skribis en N.E.

Malgraŭ mia unutema rezervo mi opinias la libron ne nur tre leginda, sed nepre studinda; ĝi estas plena de instruoj.

Kelkaj komposteraroj preterglitis la atenton de la korektisto: Ekzamena-Komitato (sen streketo!), 4 Prof-o van Wijngaarden (V) (36), kiu devas estis (esti), Be-aŭfront (u) (99).

G. J. D

NI RICEVIS:

Muzilo. Bulteno n-ro 11 de la Esperanto Muzikasocio. Eld.: MUZILO, Frederikstraat 2, DORDRECHT, Ned., ĝirkonto 21 40 09. Prezo: libervola subteno.

„*Door Inzicht tot Daad*”, trimonata revuo de „Broederschapsfederatie” (n-ro de aprilo 1967) kun artikolo de E. S. Otto pri „Zamenhof, etisch denker”.

NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Vic-prez.: S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25b, Rotterdam-12.
Tel.: 0 10 - 18 94 81.

Sekr.: S-ino J. C. Heetkamp-Senstius, Hengelolaan 5f, 's-Gravenhage.
Tel.: 0 70 - 66 96 69.

Kasistino: S-ino W. P. Lok-van Putten, Brederodelaan 36, Santpoort, (Z.).
Tel.: 0 25 60 - 76 15.

Poŝtĝirkonto: 3 45 63 je la nomo de: Alg. Penningm. Ned. Esp. Ver.
L.E.E.N., Brederodelaan 36, Santpoort-Zuid.

KONCIZE

Akademio de Esperanto.

La Akademio aprobis la ideon de starigo de „Baza Radikaro Oficiala”, kies celo estas aparte proponi la vulgaran aŭ lernolibran vortprovizon, tiel ke laŭeble „la vortaro de la lernolibroj fariĝu tute unueca, kaj ĉiu povu certe scii, kian vortkonon oni povas supozi ĉe ĉiu, kiu ĉerpis sian konon sole el lernolibro”.

Tiu baza Radikaro Oficiala estos ellaborata en la venontaj monatoj surbaze de projekto, kiu entenas proksimume 2.500 radikojn kaj elementojn, dividitajn en naŭ grupoj de ofteco: de la unua grupo de plej oftaj elementoj ĝis la naŭa kun relative malpli oftaj radikoj kaj elementoj.

(adreso de la sekretario de la Akademio: 26, rue Pierre-Joigneaux, BOIS-COLOMBES, Seine, Francujo).

„Geonkloj Esperantistaj”.

La organizo „Geonkloj Esperantistaj” alvokas al personoj, kiuj volas servi la infanojn (i.a. el Pollando kaj Hongarujo) de nia movado, proponante sin kiel onklojn aŭ onklinojn. La devoj de la geonkloj estas korespondi kun la koncerna infano, amikiĝi kun li/ŝi, kaj teni la intereson pri Esperanto.

Anoncu vin ĉe: S-ro J. H. Sullivan, 3, Berwick Avenue, URMSTON (Manchester), Anglujo.

Esperantistoj-Kolektantoj.

Ĉe la Bulgara Esperantista Asocio oni fondis sekcion „Internacia Ligo de la Esperantistoj-Kolektantoj” (ILEK). La

ĉefa celo de la Ligo estas unuigi ĉiusepacajn esperantistojn-kolektantojn en unueca solida organizaĵo, por povi helpi ilin en iliaj multnombraj kaj variaj bezonoj. Oni serĉas: membrojn, kunlaborantojn, delegitojn en la tuta mondo. Turnu vin al: „ILEK”, SOFIA 13, bulv. Lenin n-ro 83/107-A, Bulgario.

La Nova disko de Ramona van Dalsem.

En la maja numero de „Nederlanda Esperantisto” ni menciis sur paĝo 53 la aperon de la disko „La Feliĉo kaj ses aliaj kantoj” de sinjorino Ramona van Dalsem. Ni nun povas ankoraŭ menci, ke U.E.A. mendis novan serion, kiu tute estas senmanka. Jam multaj mendis la diskon. Ĉu jam ankaŭ vi? Ne hezitu, vi ne bedaŭros!

Internacia Poŝtista Esperanto-Asocio (IPEA).

„Heroldo” estas la nomo de la monata faka bulteno de la Internacia Poŝtista Esperanto-Asocio (IPEA). Ĉiu kolego (PTT radio- kaj televidisto) povas senpage ricevadi ĝin. Skribu al: Bulgario, SOFIO C, Poŝtenska kutija 25, por IPEA.

Esperanto en Komerco - kvinlingva raporto pri spertoj de 100 firmaoj el 40 landoj. Prezo: gm. 2,—, ekde 10 libroj gm. 1,35.

Esperanto-Rondo, 718 Crailsheim, Germanujo.